

Tempo- kaj modorilatoj en suborditaj kunmetitaj frazoj

1. Enkonduke

En ĉi tiu artikolo mi restas ĉe la tradiciaj terminoj ,ĉef-‘ kaj ,subpropozico‘, kvankam ili eble ne estas la plej taŭgaj¹.

El nocia vidpunkto subpropozicio estas propozicio, kiu rolas kiel sintagmo kadre de alia propozicio (la ĉefpropozicio). Ĝi povas alpreni diversajn rolojn (depende de la lingvoj), sed neniam tiun de la verba sintagmo, kp. la multajn ekzemplojn en PAG, p. 303ss.. Temas pri kompleksa sintaksa fenomeno, pro kio subpropozicioj aperas en la lingvoj de la mondo en tre diversaj maniero kaj kvanto, kion montru la sekva ekskurseto:

La modernaj hindeŭropaj lingvoj ĝenerale tre vaste uzas subordigon, sed en la pli malnovaj lingvoj de ĉi tiu familio oni trovas multe pli ofte parataksajn frazojn, kie ni uzas hipotakson. En la okazo de la rilataj subpropozicioj oni povas bone kompreni la procezon de subordiĝo de origina dufraza kombino. Unu metodo formi ion similan al rilataj subpropozicioj² estis uzado de la demanda pronomo **k^wi-* sen akcento, tio signifas en nedifina signifo. La strukturo de tia dufrazo estis do *Iu o X-as, (tiu o) Y-as.*, signifanta *La o, kiu X-as, Y-as.* Tiel ĝenerale funkcias la rilataj subpropozicioj en la hitita, ekz.

nu=mu uttar kwit ĥatrāes, n(u)=at istamassun
ptk.-al.mi vorton (k)iun skribis.2sg. ptk.-ĝin audis.1sg. (ptk. = partiklo)
,la vorton (=aferon), kiun vi skribis al mi, mi audis‘.

Tiel oni ŝajne uzas demandan pronomon por rilataj subpropozicioj en la latina (kaj la kutimon de la latinidaj lingvoj transprenis – Esperanto), kaj la tiel nomata *attractio relativi inversa* (ke la ĉefvorto havas la formon de la rilata pronomo) estas simpla arkaismo, kp. la latinan frazon (de la Maljuna Katono):

agrum quem vir habet tollitur
agron (k)iun viro havas.3sg. forprenatas.3sg.
,agro, kiun viro havas, estas forprenata‘

¹ Subpropozico povas esti ĉefpropozicio rilate al plia subpropozicio, ekz. *La homo, kiun ni vidis, kiam ni promenis, estis mia najbaro.* Tial lingvistoj preferas aliajn terminojn, ekz. en la germana ,Konstituentensatz‘ – ,Matrixsatz‘. Aliajn terminojn mi difinas jene: tenso: gramatika formkategorio montranta la rilaton inter ado kaj tempo; tenso absoluta: gramatika formkategorio montranta la rilaton inter ado kaj la tempo de la parolado; tenso relativa: gramatika formkategorio montranta la rilaton inter ado kaj la tempo priparolata.

² En la pralingvo ekzistis ankoraŭ dua maniero kun alia pronomo (**H_io-*), pro kio en la filiaj lingvoj, kiu ĝeneraligis po unu, oni renkontas du diversajn pronomojn (ekz. latine *quis*, hitite *kuis* – helene *ῥός*, vede *yá-*), sed la diferencojn mi ĉi tie ne traktas.

En la latina ekzemplo jam mankas anafora pronomo en la dua propozicio, kiu klarigus ĉi ties rilaton al al unua. Estas do facile kompreni la ĉefvorton de la *habet*-propozicio kiel subjekton de la *tollitur*-propozicio kaj „ĝustigi“ ties formon al klasika *ager(,) quem vir habet(,) tollitur*. Ĝuste ĉi tiu ŝajne malgranda ŝanĝo signifas la enkadrigon de la unua propozicio en la duan kiel subpropozicio. Ebla kialo de la procezo estas videbla en la komparo al la hitita³: Oni ŝparas la (redundan) denovan esprimon de la temo en la ĉefpropozicio, ĉar la rilaton jam klarigas la sintaksa strukturo.

2. Pri la tensa sistemo de Esperanto ĝenerale

Esperanto havas tri tensajn formojn markitajn per *as is os*, kiuj en si mem (sen kunteksto) esprimas tensecon (en indikativo; la aliaj modoj estas tempe indiferentaj), sed ne aliajn eblajn verbajn kategoriojn, precipe aspekton, kiel montras komparo inter la pola, Esperanta kaj germana tradukoj de simpla teksto:

pole	Esperante	germane
a) <i>Kobiety poszły nad rzekę, wyprały pranie, i odeszły z wypranym praniem od rzeki.</i> (perf.)	a) <i>La virinoj iris al la forlasis kun la lavitaĵoj la riveron.</i>	a) <i>Die Frauen gingen zum Fluss, wuschen die Wäsche und gingen mit der gewaschenen Wäsche wieder vom Fluss weg.</i>
b) <i>Po drodze jedne śpiewały, drugie gwizdały.</i> (imperf.)	b) <i>Survoje la unuj kantis, la aliaj fajfis.</i>	b) <i>Unterwegs sangen die Einen, die Anderen pfiffen.</i>
c) <i>Kiedy wchodziły do wioski, przed nimi pojawił się złodziej.</i> (imperf. – perf.)	c) <i>Kiam ili eniris la vilaĝon, aperis antaŭ ili rabisto.</i> (preter.)	c) <i>Als sie (gerade) das Dorf betraten, erschien vor ihnen ein Räuber.</i> (preter.)

Kiel la tensa lingvo germana ankaŭ E-o ne distingas inter koincido kaj sinsekvo. Alternative en c) eblas aspekteca precizigo per la kompleksa formo *estis enirantaj*.

En Esperanto oni depende de la esprimota temporilato konsekvence uzas la konvenan tenson (*Morgaŭ mi iros al la kinejo.*, ne **iras*, kiel oni povus diri ekz. en la pola aŭ la germana).

3. Uzado de la tensoj en suborditaj propozicioj

Dum en simplaj frazoj do la uzado de la tensoj estas apenaŭ problema (ne ekzistas diferenco inter absoluta kaj relativa tensoj), en suborditaj frazoj penseblas almenaŭ tri funkci-ebloj: a) absoluta: Oni uzas la tensojn kiel en nesuborditaj frazoj (do en rilato al la paroltempo). b) relativa: Oni uzas la tensojn en rilato al la tempo de la ĉefpropozicio.⁴ c) miksa: Oni uzas ilin jen relative, jen absolute, depende de la fraztipo. La lastan sistemon uzas PAG (§§ 269-271)⁵,

³ Tie la frazo tekstus: *Nu kweran kwin antuŝas ĥarzi, n(u)=an dānzi.*
ptkl. agron (k)iuun persono havas.3sg. ptkl.-ĝin prenas.3pl.

⁴ Tio proksimigus la simplajn tensojn al formoj de aspekto (aspektaj lingvoj kutime ne havas relativajn tensojn), se kiel oni vidas en ĉapitro 2, aspekteca valoro mankas en la Esperantaj tensoj, kaj ŝanĝo inter ĉef-kaj subpropozicia tensa sistemo estus absurda.

⁵ Same MALOVEC en ĉapitro 6.4.2.7, kiu estas nura resumo de la PAGaj paragrafoj, same rilate la aliajn temojn.

kiu donas regulojn por subpropozcioj kun relativa (§ 270) kaj absoluta (§ 271) tenso-uzoj. WILLKOMMEN en amplekseta ĉapitro (p. 51-59) instruas sistemon iom similan al b), tamen ne en ekstrema formo („Punkto, al kiu oni rilatas, estas la koncerna parolanto en la koncerna situacio.“, p. 51). Mi ĉi tie volas argumenti por sistemo a) kun unu aldona regulo.

Rilate la sistemon de PAG: Eble temas nur pri nelerta priskribo, sed oni miras unue, por kio servu tia diferencigo en planlingvo, kaj due, kial krome ekzistas esceptoj al la ĝeneralaj reguloj. PAG ĉi ĉion nur priskribas, sed ne klarigas, kvankam temas ja pri certa komplikigo de la lingvo. WILLKOMMEN ja donas principe simplan klarigon de la tenso-uzo, tamen restas iom neklare, kio konkrete estas la „realeca tempo“ (*Echtzeit*, p. 51), kaj laŭ lia gvidlinio (vd. supre) formo kiel *kiam mi venis en la ĉambron, mi vidis, ke li skribas* devus esti malĝusta, ĉar la unua propozicio ja jam formas situacion, el kies vidpunkto oni devus uzi la *as*-formon por esprimi samtempecon. Ekzemploj nekongruaj al la priparolata sistemo abundas.

PAG sur neplenaj du paĝoj (§ 234) donas la regulojn de la nereкта parolo, kiu en E-o vere facilas: tenso kaj modo ne ŝanĝiĝas per la transformo de rekta al nereкта parolo. En la ekzemploj oni trovas frazon montrantan, ke la nereкта „parolo“ entute ne estas limigita al la esprimo de io dirita⁶. Ŝajnas do, ke oni povas forlasi dividon en relativ- kaj absoluttensajn subpropozciojn, se oni akceptas, ke post verboj ne nur de parolado, sed kutime ankaŭ de pensado, sciado, scivolo kaj percepto sekvas „nereкта parolo“ (kiu tamen neniam estis „rekta“). Oni do principe uzas la tensojn en rilato al la paroltempo, kiel en simplaj frazoj, kio pro la regulo de la nereкта parolo tamen ne ĉiam estas videbla⁷. Ĉi tiuj du reguloj klarigas ne nur la ekzemplajn frazojn aperantajn en la reguloj de PAG kaj WILLKOMMEN pri la tenso-uzo, sed precipe ankaŭ la t.n. esceptojn⁸. Kiel jam PAG menciis (p. 357), post kelkaj verboj povas sekvi subpropozcioj kun relativaj (=nereкта parolo) aŭ kun absoluttensaj predikatoj⁹. Tiel klariĝas ŝajnaj esceptoj kiel *Nun la soldato sciis, kia eksterordinara fajrilo tio estis*.² (WILLKOMMEN:54 – li mirige ne prikomentas la „neregulan“ formon *estis*).

Restas nur tre malmultaj atestoj, kie oni ne trovas simplan klarigon, ekz. [...] *ŝi estis tiel bela, ke ĉiu povas vidi, ke ŝi estas vera reĝidino*.² (WILLKOMMEN:54). Ĉi tie oni eblu pensu pri vigla rakonto, do imago pri kvazaŭa nuntempo de la priskribata sceno, aŭ pri formo de ĉiamveraĵo. Tutan serion da malfacilaj frazoj oni trovas en „La novaj vestoj de la reĝo“ (WILLKOMMEN:57), ekz. *Ili starigis du teksilojn, faris mienojn[,] kvazaŭ ili laboras, sed havis nenion sur la*

⁶ Ekz. *Ili ne sciis, ke trafos ilin malbono*.²

⁷ Same instruas PMEG (33.8), donante ampleksan liston de vortoj, post kiuj sekvas nereкта parolo.

⁸ Z.B. *ŝajnis, ke pluvos* (percepto) – *li havis la opinionon, ke ĉio prosperos* – „esceptoj“: *estis bona ŝanco, ke ne pluvis* – *li rakontis, kiel li procedos* (PAG §§ 270/271); *Post unu jaro la dua fratino ricevis la permeson[,] sin levi tra la akvo kaj naĝi kien ŝi volas*. (WILLKOMMEN:57).

⁹ Ekz. *mi vidis, kiel li kuris* – *mi aŭdis, kiel bruas la plandoj de l' marŝantaj soldatoj* (l.c.).

teksiloj. Temas ĉiam pri subpropozcioj kun *kvazaŭ*, kaj PAG (§271.7) klarigas la uzadon de la *as*-formo per „prezenco eterna“ (do gnoma akcionaleco). Tamen ja en la supra ekzemplo ne vere temas pri io ĉiam vera. Alian klarigon donas WENNERGREN, kp. la sekvan ĉapitron.

Per tio, ke frazoj kun nereкта parolo enkondukas virtualon punkton de parolo (de kiu dependas la tenso-elekto en la subpropozcio), oni efektive ricevas informon pri la rilato inter agotempo (de la subpropozcio) kaj referencotempo (de la ĉefpropozicio), dum en subpropozicioj kun efektive absoluta tenso-uzo oni aŭ ne povas tion vidi laŭforme, aŭ devas uzi kompleksajn tensojn, kp. la preskaŭ samsignifajn frazojn *estis bona ŝanco, ke estis pluvinte – ke pluvis, mi opiniis bona ŝanco*: en ambaŭ frazoj la referencotempo estas antaŭ la nuntempo, kaj la agotempo (de *pluvi*) estas antaŭ la referencotempo, aŭ *estis damaĝe, ke estis pluvonte – mi lamentis, ke pluvos*: en ambaŭ frazoj la referencotempo estas antaŭ la nuntempo, kaj la agotempo (de *pluvi*) troviĝas post la referencotempo.

4. Uzado de la manieroj en suborditaj propozicioj¹⁰

Krom reguloj pri la sinsekvo de tensoj (latine *consecutio temporum*) en multaj lingvoj ekzistas ankoraŭ reguloj pri la uzado de manieroj en subpropozicioj, kp. la detalan disigon inter indikativaj kaj subjunktivaj subpropozicioj en la latina bazo de konvencio aŭ delikataj semantikaj nunacoj.

En Esperanto la uzado de difinita modo postulas nur la sencojn, pro kio ne estas multaj diferencoj inter la manieroj en subpropozicioj kaj en ordinaraĵoj. La indikativo estas uzata, kiam la parolanto opinias la enhavon de sia eldiro reala aŭ kiam li ne volas konstati ties (ne)realecon; la volitivo kutime estas uzata por esprimi intencan modecon indikantan, ke la enhavo de la eldiro estas intenco de la parolanto; kaj fine la kondicionalo kutime esprimas, ke la efektivigo de la ado dependas de iu kondiĉo (taksita nereala).

Tamen oni povas atentiĝi pri du specialaj uzad-manieroj de la *u*- resp. la *us*-modo.

En celaj subpropozicioj (kp. PAG § 268), enkondukitaj per *por (tio) ke*, oni ĉiam uzas la volitivan, ĉar la realigo de la enhavo de la subpropozicio respegulas certan intencon kaj dependas de la ĉefpropozicio, ekz. *ili faris ĉion eblan, por ke li sentu sin hejme*. Preskaŭ ĉiuj aliaj *ke ...u* subpropozicioj klarigeblas per la regulo de la nereкта parolo (ekz. *ordonu al li, ke li ne babilu²*), sed foje la volitivo simple substrekas la logikan dependecon de la subpropozicia enhavo de la ĉefpropozicio, ekz. *jam ne multe mankis, ke mi faru tre fundajn esplorojn²*. La funkcioj de la volitivo en subpropozicioj estas do sumigebla per tio, ke ĝi esprimas devan modecon (*deontische Modalität, modalność deontyczna*), do ke la parolanto opinias la enhavon de sia eldiro necesa, obligacia, (mal)permesita aŭ plenumenda.

¹⁰ Kp. PAG § 116, PMEG: 26.2-4.

Alia temo estas la imagataj-komparaj subpropozicioj enkondukitaj per *kvazaŭ* (kp. PAG § 263 kaj precipe la enketon de WARINGHIEN en LV:210-221), pri kiuj jam supre temis. Ĉar ĝi signifas „tiel kiel estus se“ (PMEG 33.7), en la hodiaŭa lingvouzo kutime sekvas verbo en kondicionalo, sed ĉe Zamenhof oni trovas multajn ekzemplojn kun indikativa verbo. Tio ne estas preferinda, sed allasebla ĉar „jam *kvazaŭ* montras la imagecon sufiĉe klare“ (l.c.).

Alia okazo estas, „se *kvazaŭ*-frazo iel redonas ies penson, tiam oni plej ofte ja uzu la realan modon. Tiam temas pri **nerekta parolo**“ (l.c., grasigo en la originalo); ja Zamenhof uzis *kvazaŭ* ankaŭ en eksplika funkcio, kiam oni hodiaŭ uzas simplan *ke* kun indikativo, ekz. *Ŝi havis la senton, kvazaŭ ĉi tio estas ŝia arbo.*¹¹ – *Li havis la senton, ke la mondo kaj ĝia tumulto havas plu nenian rilaton al li [...]*².

Tamen ankaŭ post ĉi tio restas iom da dubo, kiel klarigi la jam cititan *Ili starigis du teksilojn, faris mienojn[,] kvazaŭ ili laboras, sed havis nenion sur la teksiloj*. Eble oni akceptu finfine la PAGan klarigon (vd. supre), eksplicante la frazon al vere gnoma „kiel oni kutime faras, se oni laboras“ aŭ simile.

5. Konklude

Oni vidis, ke la Zamenhofa lingvouzo ne ĉiam estas klara aŭ facile deduktebla per logiko, sed ŝajnas, ke la evoluo de Esperanto intertempe forigis la dubajn okazojn.

Tiel post *kvazaŭ* oni hodiaŭ regule uzas kondicionalon (jam Kabe tiel faris), kaj fiksas ties vortspecon (dum ĝi ĉe Zamenhof ankoraŭ estis iom pli elasta, LV:218), forigante la eksplikan *kvazaŭ* (favore al *ke*), kaj samtempe plivastigante ĝian uzadon (al okazoj, kie Zamenhof ankoraŭ ofte uzis *kiel se*: PMEG 33.7).

La uzado de la modoj nuntempe apenaŭ kaŭzas malfacilaĵojn; Se estas ideo pri fikcieco, oni uzas kondicionalon, se ideo pri io deviga (ĉu ordono, ĉu nepra konsekvenco) – volitivon, kaj se mankas ĉi tiaj nuancoj – indikativon.

Ankaŭ la uzado de la tensoj en subpropozicioj ŝajne estas pli granda problemo por la lingvistoj ol por la lingvouzantoj, kiuj ĝenerale sekvas la kutimojn de Zamenhof, kiuj – kiel evidentiĝis spite al komplikigaj teorioj de kelkaj gramatikistoj – baziĝis sur tre simpla kaj logika sistemo.

Literaturo kaj mallongigoj

Cyril BROSCHE, *Lingvosciencia vortaro*, malneto, s.l., s.j.

Johannes FRIEDRICH, *Hethitisches Elementarbuch I* [Elementa lernolibro de la hitita], Heidelberg³1974

Helmut GLÜCK (eld.), *Metzler Lexikon Sprache* [Metzler-a leksikono pri lingvo], Stuttgart – Weimar³2005

Heinrich HETTRICH, *Untersuchungen zur Hypotaxe im Vedischen* [Esploroj pri la veda hipotakso], Berlin – New York 1989

¹¹ Ĝuste ĉi tiun frazon PMEG donas kiel ekzemplon por rekta parolo en *kvazaŭ*-propozicio.

KALOCSAY Kálmán, Gaston WARINGHIEN, *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, Rotterdam
41980 (**PAG**)

Miroslav MALOVEC, *Gramatiko de Esperanto*, interreta versio, s.l., 1999

Gaston WARINGHIEN, *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*. Rotterdam 21989 (**LV**)

Bertil WENNERGREN, *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG)*, interreta versio:
www.bertilow.com/pmeg/

Dirk WILLKOMMEN, *Esperanto-Grammatik*, Hamburg 2001